XXXIa ORDINARA TEMPO – 31-an de oktobro 2010-a

LA FILO DE HOMO VENIS, POR SERĈI KAJ SAVI LA PERDITAĴON - Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 19,1-10

Kaj li eniris en Jeriĥon kaj ĝin trapasis. Kaj jen viro, nomata Zakĥeo; kaj li estis ĉefimpostisto, kaj li estis riĉa. Kaj li penis vidi Jesuon, kia homo li estas: kaj li ne povis pro la homamaso, ĉar li estis malgranda je staturo. Kaj antaŭkurinte antaŭen, li supreniris sur sikomorarbon, por lin vidi; ĉar li estis preterpasonta tie.

Kaj kiam Jesuo venis al la loko, li suprenrigardis, kaj diris al li: Zakĥeo, rapide malsupreniru, ĉar hodiaŭ mi devas loĝi en via domo. Kaj li rapide malsupreniris, kaj akceptis lin ĝoje. Kaj vidinte, ĉiuj murmuris, dirante: Ĉe pekulo li eniris, por gasti.

Kaj Zakĥeo, starante, diris al la Sinjoro: Jen duonon de miaj posedaĵoj, Sinjoro, mi donacas al la malriĉuloj; kaj se el iu mi maljuste eldevigis ion, mi redonas kvaroblon.

Kaj Jesuo diris al li: Hodiaŭ venis savo al ĉi tiu domo, ĉar li ankaŭ estas filo de Abraham. Ĉar la Filo de homo venis, por serĉi kaj savi perditaĵon.

La mesaĝo de Jesuo estis nomata evangelio, tio estas Bona Novaĵo. Sed ĉu tiu Bona Novaĵo validas por ĉiuj, ankaŭ tiuj kiuj povas aspekti senesperaj kazoj? Ŝajnas efektive ke jes. Kiel instruas al ni la ĉi-dimanĉa evangelio, la unuaj dek versikloj de la ĉapitro 19 de Luko.

Skribas la evangeliisto, "*Jesuo eniris en Jeriĥon*" la fakto ke estas citita Jeriĥo, estas ĉar Jeriĥo estis la lasta urbo renkontita de la hebrea popolo dum ĝia Eliro al la promesita lando, antaŭ ol eniri ĝin. Kaj samkiel Josuo, kiu havas la saman nomon de Jesuo, savis de tiu ĉi urbo la prostituitinon Raab, tiel Jesuo en tiu ĉi urbo savas alian personon kiu sin vendas pro mono, la impostiston Zakĥeon.

La citaĵo de Jeriĥo celas komprenigi al ni ke, dum la eliro de Jesuo, neniu estas ekskludita. "*Kaj ĝin trapasis, kaj jen viro, nomata Zakĥeo*". Zakĥeo, la hebrea Zakkai, signifas 'pura' kaj tiu nomo estas eĉ tri foje ripetata, kio signifas la tutecon.

Sed ĉi tiu homo estas kiel eble la plej malpura, fakte li estas la ĉefo de la impostistoj. Impostistoj estis la kolektistoj de la akcizoj, de la impostoj, la ekzekuciistoj, kiuj, pro la fakto ke ili kunlaboradis kun la

romianoj kaj pro la fakto ke ili praktike estis kanajloj, estis konsiderataj malpuraj sen ajna savebleco. Ankaŭ se en iu estonteco ili konvertiĝus, por ili ne estintus savebleco, tiom ili estis falintaj en la malpuron.

Ĉar la impostistoj sin konsideris la malobeantoj de ĉiuj ordonoj; estis malpura la impostisto, estis malpura lia hejmo, la stango per kiu li kontroladis la varojn, do por la impostistoj ne estas savo.

Sed tio por Jesuo ne estus problemo, ĉar Jesuo jam vokis lin sekvi, ĝuste iun impostiston, Levi, kaŭzante la mishumoron de la konformistoj. Sed estas krome la fakto ke tiu impostisto estas eĉ riĉa, kaj Jesuo estis tre klara: por la riĉuloj ne estas loko en lia komunumo. En la komunumo de Jesuo estas loko por la sinjoroj, sed ne por la riĉuloj.

La sinjoro estas tiu kiu donas kaj kunpartigas kun la aliaj, la riĉulo estas tiu kiu havas kaj retenas por si mem. Do Jesuo diris: "*Estas pli facile por kamelo eniri en iu kudriltruon, ol ke iu riĉulo eniru en la regnon"*. Do temas pri persono kiu estas ekskludita.

"*Kaj li penis vidi Jesuon, kia homo li estas; kaj li ne povis pro la homamaso, ĉar li estis malgranda*.." la greka vorto estas micros, el kiu mikrobo, "*… je staturo*". La evangeliisto ne iris mezuri je centimetroj la altecon de Zakĥeo; la fakto ke li diras ke tiu estis malgranda je staturo signifas ke, estante riĉa, li ne estas je la nivelo de Jesuo. Submergita per siaj havaĵoj, per siaj posedaĵoj, per siaj oraĵoj, la riĉulo ne povas percepti la ĉeeston de Jesuo.

"*Kaj antaŭkurinte …*" la kurado en tiu kulturo samvaloras al irado renkonte al malhonoro, sed Zakĥeo pli malhonorigita ol tiel ne povas esti, pro kio li ne havas tiajn problemojn, *"… antaŭkurinte antaŭen, li supreniris sur sikomorarbon, por lin vidi; li estis preterpasonta tie".*

La evangeliisto, preter la folklora rakonto kiun li povas prezenti, estas donanta gravan teologian indikon. La personoj, la popolo opinas ke, por renkonti la Sinjoron, oni devas supreniri. Ili ne komprenis ke, kun Jesuo, ne plu estas bezonate, ĉar estas la Sinjoro Jesuo kiu descendis por resti flanke de la homoj.

"*Kaj kiam Jesuo venis al la loko, li suprenrigardis kaj diris al li: Zakĥeo, rapide malsupreniru, ĉar hodiaŭ mi devas*…" la verbo 'devi' estas faka termino, utiligata de la evangeliistoj, por indiki la volon de Dio. Do tio kion Jesuo estas faranta, kongruas ĝuste kun la plano de Dio pri la homaro, ke neniu estu perdita. "*Mi devas loĝi en via domo*".

Tio kion Jesuo estas diranta, estas grava, ĉar la hejmo de iu impostisto estas malpura, kaj do enirinte ĝin iĝas ankaŭ li malpura. "*Kaj li rapide malsupreniris, kaj akceptis lin ĝoje*" Kial Zakĥeo estas ĝojoplena? Ne nur pro la akcepto de Jesuo, sed pro tio kion li estas faronta. Li komprenis ke la beateco kiun Jesuo eldiras en la Agoj de la Apostoloj, tio estas ke estas pli da ĝojo en la donado ol en la ricevado kaj, el riĉa kia li estis, li iĝos malriĉa, ĉar tiel li eniros en la beatecon, en la plenecon de la feliĉo.

"Kaj vidinte, ĉiuj murmuris," jen la personoj, la konformistoj murmuras, ne kontraŭ Zakĥeo, sed kontraŭ Jesuo, "*Ĉe pekulo li eniris, por gasti!"*

Tio estas la tria kritiko kiun Jesuo ricevas. Li ĝin jam ricevis kiam li vokis la impostiston Levi lin sekvi – en la sekvantaro de Jesuo estos impostistoj, sed ne fariseoj, la piuloj – kiam li akceptis la pekulojn – kaj tiu ĉi estas la tria fojo. La religiuloj ne komprenas ke la akcepto de Jesuo igas puraj la personojn; ili pensadis ke la pekulo devintus sin purigi por poste alproksimiĝi al Sinjoro. Kun Jesuo ĉio estas malsama: estas la akcepto de Jesuo kiu igas la personojn puraj.

Sed la religiuloj kun la pekuloj ne volas havi ajnan kontakton, oni devas ilin minaci, admoni, kaj precipe, teni ilin aparte. Sed ne tiel, bonŝance, pensas Jesuo.

"*Kaj Zakĥeo starante, diris al la Sinjoro: Jen duonon de miaj posedaĵoj, Sinjoro, mi donacas al la malriĉuloj*". Li komencas eniri en la beatecon, li komprenas la ĝojon doni. Tio kion iu persono konstruas, ne estas tio kion li havas, sed tio kion li donadas al la aliaj. "*Kaj se el iu mi maljuste eldevigis ion*" kaj li ja maljuste eldevigis, "*mi redonas kvaroblon*".

La libro de la Levidoj devigis redoni la sumon plus kvinoblon; li faras plie, li redonas la kvaroblon. Kio okazas? Ke Zakĥeo ne plu estas riĉa, sed en la momento kiam li ne plu estas riĉa, li liberiĝas je tiu balasto kiu malpermesis al li kreski, jen kial li estis malaltstatura.

Kaj jen fakte la respondo de Jesuo al la faro de Zakĥeo: ""*Hodiaŭ*…" ĝuste same kiel al la bandito kun li krucumita, Jesuo parolas pri iu hodiaŭo de savo, "…*venis savo al ĉi tiu domo*". Estas la ununura fojo en la evangelio de Luko ke estas uzata la vorto 'savo', "*ĉar li ankaŭ estas filo de Abraham"*.

Jesuo estis prezentita de la anĝeloj komence de tiu ĉi evangelio kiel "la Savanto", kaj li venis porti la vivon. Kial Jesuo portis la savon al Zakĥeo? Ĉar la elekto de Zakĥeo estas ne plu esti riĉa, ĉar estis la riĉeco kiu detruis la personojn.

La vivon oni akiras donante, ne prenante, kaj Zakĥeo fine tion komprenis. Li komprenis ke tio kion oni donas estas vere tio kion oni posedas, ĉar tio kion oni tenas por si mem oni ne posedas, sed estas tio kion la homo posedas lin igante malfeliĉa.

Kaj jen la sentenco de Jesuo: "*Venis savo, ĉar li ankaŭ estas filo de Abraham*" estas forigita la malhelpo, "*La filo de homo*" tio estas la homo en sia pleneco "*venis, por serĉi kaj savi la perditaĵon*".

Jen la agado de Jesuo, komuniki vivon al ĉiu homo. La agado de Jesuo ne haltas antaŭ ajna situacio, kiel en la kazo de tiu ĉi riĉulo, de tiu Zakĥeo, kiu povis esti konsiderata senespera kazo. La Bona Novaĵo estas por ĉiuj.